SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT. bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

AGAD-RAPORTARO DE LA PLENUM-KOMITATO (1934-35)

a) ĜENERALA PARTO

I. ORGANIZADO.

Plenum-Komitato. — La konsisto de la P.-K. restis la sama dum tiu ĉi raportjaro, kiel antaŭjare ; escepte ke eksiĝis en oktobro K-do *Bubo* pro siaj profesiaj studoj k pro tio, ke li ne restis en Parizo. La nomoj de la Komitatanoj troviĝas en la *Jarlibro* ; K-do *Ĝermen* (=H. P.) restis prezidanto. La kunsidoj de la P.-K. okazis regule ĉiudusemajne k ĝiaj protokoloj atestas pri la plenumita laboro.

Ĝenerala Konsilantaro. — Per referendumo, kiu finiĝis la 15-an de junio, estas elektitaj Konsilantoj por 7 horzonoj, en kiuj SAT havas sufiĉan nombron da membroj. Partoprenis la referendumon 12 % procentoj el la aktiva membraro. — Verŝajne la relative malgrandan proporcion kaŭzis la cirkonstanco, ke la demandaro koncernis nur la elekton de Konsilantoj k ne ŝanĝon en la Statuto. La Konsilantoj delegitaj de siaj LEA-oj en la Ĝ.-K.-on, letere interrilatis kun ni k hekpis en ĉiuj demandoj koncernantaj la kontakton inter SAT-LEA.

Administracia Komisiono. —Ankaŭ en tiu ĉi jaro ne estis eble formi tian Komisionon, kies starigo ja ne estas statute postulata, sed kiu en iuj antaŭaj jaroj pli malpli bone funkciis. Mankas en Parizo kompetentuloj por plenumi fakece tiun taskon. Kaj estus kvazaŭ komedio delegi K-dojn, kiuj ne kapablas plenumi normale la rolon. Ĝis la elekteblo de tia komisiono, ni daŭrigos praktiki la ĝisnunan sistemon de *reciproka kontrolado*, kiu prezentas relativan garantion pri la bonordo de la spezaro : okupo de tri K-doj kun fakaj spertoj (Banmer, Bartelmes, Ĝermen) pri la administra laboro. Ĉar la fakoj de la administracio intertuŝiĝas en la praktiko, sekve la reciproka kontrolo daŭre funkcias.

Frakcioj. — La Frakcioj, pri kiuj la Statuto ne parolas, sed kies starigo tamen estis permesata ekde la komenciĝo de SAT, k kies agadkampo esence kuŝas ekster la kadro de la Asocio, revigliĝis parte en tiu ĉi jaro. Ĉar la Frakcioj kunigas anojn de difinitaj politikaj tendencoj, kiuj devas trovi en tiuj aparatoj ilon por pensinterŝanĝo, propagando k aplikado de esperanto en siaj apartaj medioj, ekzistas iuj danĝeroj por SAT kiel senpartieca organizo, pro eventualaj interpuŝiĝoj aŭ misuzoj de la konsentitaj rajtoj (speciale la rajto enpresigi komunikojn en la oficiala organo). Precipe eluzis la rajtojn ĉi-jare la Socialista k Sennaciista Frakcioj, krome la lastatempe fondita Bolŝevist-leninista Frakcio. Sed pro manko de Regularo, fiksanta la rajtolimojn de la frakcioj, nek unu nek la aliaj el la frakcioj restis en la antaŭvidita kadro. Persona kontakto kun la sekretarioj de la Sennaciista k Socialista Frakcioj ebligis al ni forigi la miskomprenojn ; perletere ni provis klarigi al la iniciatintoj de la « Bolenfrasat » la rajtojn de la frakcioj konsistigitaj el anoj de nia Asocio.

Okaze de plendo de frakciano kontraŭ sia frakcio, ni memorigas, kio jam estis dirita en Valencio, — ke nek la P.-K. nek la K.-K. estas kompetentaj por enmiksiĝi konfliktojn, kiuj rilatas organojn funkciantajn ekster la kadro de la organizo.

Kune kun tiurilata propono de K-do *de Bruin* (ĝi aperis en la lasta n-o) la Kongreso havos okazon pritrakti la tekston de *Regularo pri Frakcioj*, kiun ni prezentos al ĝi por pridiskuto.

Konflikt-Komisiono. — Ĉi tiu instanco funkciis regule ; la sekretario rilatis skribe kun ni en okazo de bezono. Li aperigos aparte sian raporton.

Rilatoj kun L.E.A.-oj. — La rilatoj estis treege amikaj kun la grandaj LEA-organizoj en Nederlandlingvio (FLE), Svedio (SLEA) k Franclingvio (FEO). La tuta membraro de F.L.E. restis daŭre abonita al « Sennaciulo », kio signifas konstantan gravan propagandon, por niaj ideoj ĉe proks. 2.500 personoj, kiuj staras ekster la vico de nia Asocio, sed kiuj tiel tamen estas ligitaj, per la monata legaĵo, al la tutmonda movado. Plivastigi la pensmanieron de la esperantista laboristo trans la naciajn kadrojn k liveri al li tiele per esperanto vere la instrumenton malfermantan antaŭ li la barojn, kiuj malhelpas al la popoloj interproksimiĝi, — tiu ideo trovas en la estroj de N.F.L.E. konsciajn ĉampionojn. Kaj tie ni renkontiĝas kun ili sur la sama tereno. — Pro financaj (sed ne pro ideaj) konsideroj la sveda L.E.A. ne plu liveris ekde januaro al sia membraro « La Lernanto »n. Cetere per tiu procedo nia Asocio finance ne malprofitis. Male ! Ĉar malprofitigaj por la SAT-kaso estis la kondiĉoj fiksitaj de nia antaŭa Administranto K-do Lerĥner. Kaj aliflanke ni povis registri *kreskantan nombron da anoj* en Svedio kun abono al « Sennaciulo » (sekve ankaŭ al « La Lernanto ») ; el ili eble multaj venis, sekve de nia alvoko en la decembra « L.L. », kiun numeron ricevis ankoraŭ ĉiuj legantoj de la Sveda lab. esp. gazeto. Ĉi tiu gazeto subtenis regule per varbartikoletoj la propagandon por nia organizo ; ankaŭ la Asocio sekretario de SLEA zorgis pri havigo de adresoj de kursanoj al nia dispono por nia varblaboro (same tiel okazis en Holando). En la franclingva parto da Belgio ni liveris al ioma kvanto da K-doj « S-ulo »n laŭ la samaj

favoraj kondiĉoj kiel al la holanda-flandra LEA-membraro ; la administran flankon prizorgis K-do *Van Aelst*, sekretario de FEO por Belgio. En Francio la pli gravaj FEO-grupoj (escepte de Filipvilo en Alĝerio !) liveris malmulte da membroj al SAT, dum la *izoluloj* en etaj lokoj, anoj de FEO, preskaŭ senescepte estas ankaŭ SAT-anoj ! La pli malgrandaj SAT-varbaj organizoj : *SAT en Britio* k *SAT en Danio* montris kontentigan agemon kun parte bonaj rezultoj. (Granda kresko en Manĉestro.)

Tie, kie la LEA-oj estas malpli ligitaj kun SAT, aŭ kie la situacio estas konfuza, kiel ekzemple en Ĉeĥoslovakio, Norvegio, Polio, aŭ kie ne ekzistas tutlandaj LEA-oj (Hispanio, Portugalio, Usono k.a.), niaj fidindaj ĉefperantoj zorgis pri la varbado por SAT, aŭ minimume pri la transpago de kotizoj. Ni nomu la senlaculon *Julio Ege* en Los Angeles (Kalifornio), K-don *Fremr* el Plzen (Ĉeĥosl.), K-don *Lekowski* en Polio, la K-dojn *Amundsen* en Oslo, *Hernandez* en Valencio, *Lobo* k *Sanches de Castro* en Portugalio, *Santos* en Argentinio, *J. Sulski* en Britio, k.a., kiuj pardonu, se ni ne nomas ilin ĉi tie.

Rilatoj kun I.P.E. — La problemo pri reunuigo de la Laborist-esperanta movado estis starigita sur la tagordon de la XIV-a Kongreso en Valencio. Konforme al la komisio de la Kongreso, ni *a*) transsendis la 6.9.34 al la IPE-centro la Rezolucion de la Kongreso, kiu entenas la kondiĉojn plenumendajn por krei bazon por la reunuigo ; *b*) konigis proponon akceptitan de la Kongreso, per kiu la Centro IPE-a bonvolu konsideri la « reunuigon en organizon, kiu havigas al ĉiuj tendencoj de la klasbatala laborista movado la samajn rajtojn k devojn, kiel estas ĝis nun en SAT. » La respondo de IPE (5 dec.) estis polemikeca k entenis manifeston, adresitan ne al la estraro de SAT, sed rekte al « ĉiuj laborist-esperantistoj en la mondo », k en kiu estis memlaŭde rekomendata IPE kiel model-organizo de l'proletaj esp-istoj (kun ĝia ido PEK). Ni aperigis en la februara « S-ulo » responde al tiu skribaĵo artikolon verkitan de K-do *Lanti*, spegulantan nian vidpunkton pri la problemo : « Principoj de Unueco ». Ni komunikis ĝin kun mallonga akompana letero al la IPE-centro, k de tiam nenion plu aŭdis de ĝi. Tamen ni estas informitaj pri klopodoj de IPE-grupoj sur *loka* bazo aranĝi unuecan agadon. Pri partopreno en tiaj *lokaj* aranĝoj cetere ni devas tute lasi la respondecojn al la unuopaj K-doj.

Rilatoj kun neesperantistaj organizoj. — Konforme al kongresdecido ni interrilatis kun la nederlanda laborista radio-asocio VARA, — kiu disponas en iuj tagoj la stacion Hilversum, — por instigi ĝin enkonduki *peresperantajn* programojn. Kvankam ni ne povis atingi per la leterinterŝanĝo rezulton en la senco de la kongrespropono, ni tamen kun kontentigo rimarkis, ke nelonge post nia interveno, la nederlanda LEA, post longa interrompo, denove sukcesis kontrakti kun VARA pri dufoje monata disaŭdigo de priesperantaj novaĵoj.

Servoj. — Statistikoj pri la inter-SAT-anaj servoj badaŭrinde ne ekzistas ; ni tamen taksas ilin sufiĉe vivantaj, kvankam pri tio ne ofte ni ricevas informojn.

Ni scias pri *maristoj*, kiuj utiligas la SAT-aparaton ; ni estas informitaj pri klopodoj de iuj SAT-rondoj por praktike utiligi la SAT-aparaton al laboristaj organizoj (ekzemplo : la *Malmöa* rondo).

Kontraŭ la misuzo de servoj fare de « K-doj »- ekspluatantoj ni turnis nin en la januara « S-ulo ».

Senpagan abonservon por faŝistlandaj K-doj en mizerstato ni komencis funkciigi ekde majo (tiurilata alvoko aperis en la aprila « S-ulo »). La unuaj rezultoj de tiu servo estas kuraĝigaj.

II. Propagando.

En la propra kampo. — Por varbi novajn membrojn el la kursanoj k ankaŭ inter jam spertaj lab. esperantistoj, kiuj restis ĝis nun for de nia movado, ni havigis al ni pere de la LEA-oj k de niaj perantoj listojn de varbebluloj : ni akiris tiel pli ol 1.000 adresojn, al kiuj ni sendis parte nian varbmaterialon (2-3 ekz de « S-ulo », 1 de « S.R. », katalogon, Vortar-prospekton, aliĝilon k specialan cirkuleron). Por « Senn. Revuo » ni krome aparte propagandis en Holando, okaze de la Federacia kongreso ĉi-jara. Estis distribuataj 500 senpagaj ekzempleroj. Krome en la ĵus okazinta Kongreso de la Nederlanda LEA estis elektata K-do *Bas Vels* speciale por la varbado al SAT k ĝiaj organoj en Nederlando, subtenata en tiu laboro de la LEA-estraro finance k morale.

La rezulto el tiu propagando estas tre malfacile ciferebla, ĉar preciza statistiko signifas grandan laboron (pluan elspezon) k la nov-aliĝantoj ordinare ne montras, per kiu procedo ili estas varbitaj. Tamen ni estas konvinkitaj, ke multajn ĥovajn anojn ni ŝuldas al tiu reklamo.

Ekster nia kampo. — En la novembra n-ro de « S-ulo » ni aperigis « Publika Letero al multaj esperantistoj », per kiu ni nin turnis al tiuj ne-SAT-anoj, plejparte laboristoj, kiuj erare aliĝis al U.E.A. Tiu ĉi n-ro estas dissendita de ni al 1558 UEA-adresoj en ĉiuj landoj, kie ne regas diktatoreco, kune kun provekzemplero de « S.R. », katalogo k speciala letero kun instiga teksto. Rimarkinde por la spiritostato en iuj burĝaj rondoj estas, ke ĉ. 25 ekzempleroj revenis al ni, ĉiuj el Ĉeĥoslovakio, kiel *rifuzitaj*. Tiom forte radikiĝis en iuj cerboj la naciista spiritostato, ke oni eĉ ne volas legi unu linion el la SAT-periodaĵoj ! Kelkaj ricevintoj afable respondis al ni, sed nur treege malmultaj fakte aliĝis al SAT aŭ abonis ĝiajn organojn. Kompreneble en tio ni ne retrovis nian elspezon (ĉ. 800 fr. fr. por afranko nure) ; tamen, nedubeble, tiu propagando lasis efikon ĉe la celitaj personoj, kiuj eble iun tagon interesiĝos pli konkrete al nia movado.

Limoj. — Kiel oni scias, nia disvastig-teritorio ĉiam pli k pli malgrandiĝis kun la plimultiĝantaj diktatorecoj. Sekve, post Italio, Hungario k diversaj pli malgrandaj ŝtatoj, ni devis forstreki el la varb-teritorio Sovetion, kie nia Asocio k ĝiaj eldonaĵoj estis malpermesataj fine de 1930[1]. Komence de 1933 sekvis Germanio, kie la SAT-movado havis speciale fortajn radikojn, k unu jaron poste Aŭstrio, kie la plua laboro por nia Asocio dependas de lokaj cirkonstancoj, pli malpli favoraj, sed kie, kun escepto de unu aparte menciinda provinc-urbo, restas al ni nur fragmentoj el la antaŭa membraro.

Tamen ankoraŭ nuntempe amikoj en Germanio k Sovetio konservis skriban kontakton kun ni, kvankam ili ne povas ricevi la gazetojn, k ni scias, ke ankoraŭ pli multaj estas tiuj K-doj, el Germ. k Sov., kiuj sopiras rekontakti kun ni.

III. Gazetoj.

La tri organoj « Sennaciulo », « Sennacieca Revuo » k « La Lernanto » (ĉi lasta kiel aldono al « Sennaciulo », sed ankaŭ aparte abonata de kelkaj grupoj por iliaj kursanoj, k de kelkaj izoluloj) aperis regule ĉiumonate, tiel ke la abonantoj al ambaŭ revuoj ricevis *duonmonate* unu periodaĵon de SAT, nome la 10-an « Senn. Revuo »n k la 25-an « Sennaciulo »n. La presisto, kiu ankaŭ zorgas pri la ekspedo laŭ la adresiloj skribataj k sendataj de ni, ĝenerale akurate plenumis sian laboron, kvankam kelkfoje okazis prokrasteto en la pretigo

[1] Legi la detalojn pri tiu okazo en « Historio pri la Skismo » (eld. SAT, prezo 2 ffr.).

de la gazeto je kelkaj tagoj, pri kio tamen neniam kulpis nia redakcio nek nia administracio.

La eldonkvanto por « Sennaciulo » estis meznombre 4.200 ekzempleroj. La eldonkvanto de « Sennacieca Revuo » estis meznombre 1.150 ekzempleroj. La eldonkvanto de « La Lernanto » estas je 400 ekzempleroj pli alta ol tiu de « Sennaciulo ». (Ĝis dec. 1934 ni eldonis 2.500 pliajn ekzojn por Svedio.)

Pri la enhavo de la gazetoj oni legu la *Redakcian raporton* (parto B de la Raportaro).

IV. Eldonagado.

La financa stato de la Asocio ne permesis la pluan eldonadon de literaturaj verkoj, komencitan lastjare per la kreo de la literatura asocio A.D.L.E.L. Ni devis likvidi tiun entreprenon, pro tio ke ni ne povis liveri por la postulita monsumo la projektitan librokvanton, k pro tio, ke aliflanke ni ne kuraĝis fiksi tro altan sumon, kiu ne estus pagebla en la nuna kriza tempo de la plej multaj K-doj. Ĉe la starigo de la buĝeto por A.D.L.E.L. ni ne estis atentintaj kelkajn elspezopunktojn (ekz. la afrankokoston, kiun postulas ekspedo de ampleksa libro, kiel « Jimmie Higgins »). Ni informis per cirkulero la anojn de ADLEL pri la decido de likvido, decido, kiun ni cetere faris nur post interkonsiliĝo kun la Ĝeneralaj Konsilantoj. Ni larĝe kompensis la abonintojn al tiu serio de libroj, liverante al ili por ilia kredito la verkojn aperintajn ĉe SAT kun 50%-a rabato (escepte de la P. Vortaro). Ni liveris ankaŭ librojn el kelkaj aliaj eldonejoj, tamen nur en tre limigita kvanto, al ADLEL-anoj, por eluzi la krediton. (*Kelkajn ciferojn oni trovos en la Administracia Raporto*). Nur unu K-do protestis, en akra tono, kontraŭ tiu likvido. Ĉiuj aliaj, kiuj skribis, bedaŭris, ke la cirkonstancoj ne ebligas daŭrigi la entreprenon.

Ni jam parolis lastjare pri la kritikoj (laŭdaj k mallaŭdaj) rilate al « Ŝvejk » ; rilate al « Jimmie Higgins » estis simile, sed unuanime estis laŭdata de la recenzintoj la trafa elekto de tiu libro por eldono ĉe ADLEL. Multaj recenzistoj bedaŭris, cetere prave, ke la lingvaĵo de la traduko ne estas tre kontentiga. Ni devas konfesi, ke pro troa pezo de la laborŝarĝo en tiu epoko (koincido kun la reorganiza laboro de la administracio) ni ne sufiĉe konscience povis prizorgi la korektadon de tiu ampleksa manuskripto. Sed — trafe diris iu recenzisto, la pasieco de la legaĵo estas tiagrada, ke oni jam post la legado de kelkaj paĝoj forgesas pri la formo, t.e. la lingvo.

Niaj financaj rimedoj permesis nur eldoni la *Jarlibron*, liveritan al la membraro en februaro, kiu ciferas 1537 anojn, kun la adresoj de Perantoj, funkciuloj k izoluloj. La libreto ampleksas 24 paĝojn plus 4 kovrilpaĝoj surpresitaj (formato 13 × 20 cm). Pri ĝia enhavo ni ne ricevis kritikojn de la ricevintoj, kio permesas al ni pensi, ke ĉiuj kontentas pri ĝia aranĝo k ke ĝi estas utila en la praktiko.

En majo aperis la broŝuro 20-paĝa (krom kovrilpaĝoj) — formato 13 × 19 — kun titolo « Historio pri la Skismo en la Laborista Esperanto-Movado ». Ĝian verkadon k eldonon ni decidis por permesi al ĉiuj laboristaj esperantistoj klare k scie prijuĝi la situacion, okaze de la nuntempaj klopodoj pri reunuigo de la movado, k por povi kompreni la kondiĉojn, kiujn ni starigas ĉe la bazo por ebligo de tiu reunuigo.

V. Membrostato.

Kompare kun la antaŭ-jaro la stato estas preskaŭ la sama (en majo 1935 ni nombris 1.244 membrojn). Tamen la fizionomio de la membraro iom ŝanĝiĝis : nome ni gajnis, parte eĉ tre konsiderinde, membrojn en diversaj landoj, kiel Norvegio, Britio, Francio, Hispanio, dum aliflanke ni perdis el la malgranda nombro restinta en Germanio, ankoraŭ parton el tiuj, kiuj lastjare ankoraŭ povis aboni la gazetojn. Ankaŭ en Aŭstrio ni malgajnis pro sama motivo. Nederlando marŝas ĉe la pinto rilate membrokvanton, kun 310 membroj.

VI. Kongreso.

La bilanco pri la XIV-a Kongreso, tre akurate farita de la Valenciaj K-doj estis ekzamenita k aprobita de ni. Por prepari la XV-an Kongreson, ni pro la loka koincido povis resti en konstanta persona kontakto kun la anoj de la O.K.K. En la kunsidoj de la O.K.K. partoprenis regule minimume unu reprezentanto de la Plenum-Komitato (tamen la O.K.K. mem konsistas nur el Gekdoj troviĝantaj ekster la gvidinstanco de SAT). Ni konsentis zorgi pri la kolektado de l'kongreskotizoj k perado de l'korespondaĵoj al la sekretario, akceptante, ke la adreso de la O.K.K. estu tiu de la Sidejo de la Asocio (kio multe plisimpligas la manieron de aliĝo). Ni disponigis, same kiel en antaŭaj jaroj, la spacon de la oficiala organo laŭbezone por la komunikoj de la O.K.K. k al artikoloj rilatantaj la kongreson aŭ la kongresurbon.

*
* *

Ĉe la fino de tiu ĉi « ĝenerala parto » de la raportaro ni memorigas la membraron, ke laŭstatute finiĝos kun la fino de la kuranta jaro nia mandato pri gvidado de la Asocio. Konforme al la regularo ni atentigis pri tio en la maja n-ro de « Sennaciulo ». La Kongreso devos esprimi sin aprobe aŭ malaprobe pri nia gvidado, kiun ni plenumadas kun plena konscio pri la respondecoj rezultantaj el tiu malfacila tasko. La Kongreso ankaŭ devos konsideri eventualajn novajn kandidatecojn por la venonta mandatperiodo. Kia ajn estu la juĝo de la Kongreso, ni ne bedaŭras esti dediĉintaj niajn fortojn en la servo de nia Asocio, kiu, laŭ multaj etaj signoj, malgraŭ ekonomia krizo k politika ĥaoso, ree surpaŝis la supreniran vojon.

Esperanto en la servo de naciismo k reakcio

Por konformi al la kondiĉoj, sub kiuj en Germanio ajna privata gazeto havas viveblon, la servemaj germanaj esp-istoj el GEA starigis propagandan centron kun la celo « ĝustinformi » la eksterlandanaron pri la « granda transformiĝo » de Germanio sub la regado de la laboristbuĉanto Hitler. Tiu ĉi centro havas la taskon doni al individuaj esp-istoj la instrukciojn necesajn por persvadi letere la naivajn « samideanojn » tra la mondo.

Sed la kompatindaj loĝantoj en la Tria Regno ja ne scias, ke la ekstergermaniaj homoj estas pli bone informitaj pri la interna situacio de Germanio, ĉar ankoraŭ la sekretaj instrukcioj al la germana gazetaro ne validas trans la limoj de la teŭtonoj. Pri tio aperis interesaj konstatoj en « Manchester Guardian », kiu i.a. skribis, ke ĉiuj anglaj ĵurnaloj detale priparolis la incidenton dum novpagana kunveno, en kiu du opoziciaj kristanoj estis interrompitaj k malbone traktitaj, dum eĉ ne vorto aperis pri tio en la germanaj ĵurnaloj. Tiu angla liberala ĵurnalo publikigis longan liston da instrukcioj pri la sinteno rilate al la aktualaj problemoj.

La antifaŝista k liberema espistaro tamen devas bone atenti pri tiu « eksterlanda servo » de la germanaj hitleraj esp-istoj. Ĝi ne toleru la disvastigon de doktrino k tiutendencaj mensogoj helpe de esperanto, kiuj lastfine kaŭzos la pereon kune kun la kulturo ankaŭ de l'ideo pri internacia lingvo. Ni ne povas atendi efikan kontraŭagon de la burĝa espistaro, ĉar ĝi estas « neŭtrala » aŭ eĉ simpatia al tiu agado. Ili ja forsegas mem la branĉon, sur kiu ili sidas.

Ĝim Talp.

XV-a KONGRESO DE SAT EN PARIZO

3.-7. aŭgusto 1935

Adreso: SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20

6. *Komuniko.*

Patronada Komitato. Por patroni nian Kongreson formiĝis Komitato, konsistanta el personoj, konataj en la laboristaj rondoj pro sia aktiveco en la literatura aŭ politika kampo je la favoro de la lab. movado. Jen la nomoj de la ĝis nun aliĝintaj K-doj :

1. *L. Cancouet*, sekretario de Fervojista Sindikato (Rive Gauche) C.G.T. patronadas la fervojistojn ; 2. *Largentier*, sekretario de la Tipografa Sindikato Pariza (C.G.T.) ; 3. *Han Ryner*, verkisto ; 4. *E. Sayer*, sekretario de la Kliŝista Sekcio de la Fed. de Libro- k Paper-Laboristoj (C.G.T.U.) ; 5. *Lucien Laurat*, profesoro ĉe Kleriga Laborista Centro de C.G.T. ; 6. *Fontaine*, estrarano de C.G.T.S.R. ; 7. *Besnard*, sekretario de C.G.T.S.R. ; 8. *Cudenet*, sekr. de Radik. Soc. Partio (Cam. Pelletan), C.K. -ano de Ligo por Homrajtoj k 9. S-ino Cudenet-Vallienne.

C.G.T.U. k *Internacio de Socialista Kunbatalo* (ISK) promesis sendi delegiton al la Kongreso.

Fervoja rabato. Tiu afero estos solvita en la sekvantaj semajnoj. Tiuj, kiuj individue k fervoje vojaĝos al Parizo, bonvolu indiki tion okaze de sia aliĝo.

Karavanoj el Svedio k Nederlando. Laŭ la informoj, kiujn ni ricevis, la karavano el Svedio trovas bonan atenton. Ĝi okazos per trajno, ĉar la aŭtobusa veturo estas tro multekosta. Forvojaĝo la 31-an de julio, reveno en Stokholmon la 12-an de aŭgusto. Unutagaj restadoj en Hamburgo k Kolonjo. Aliĝojn akceptas K-do *Folke Rosén*, Helgagatan 36, *Stockholm*.

Karavanestroj en *Nederlando* estas: K-do *J. Preker*, Smaragdstr. 5, *Amsterdam-Z*, k K-do *C. v. Veenendaal*, *West-Graftdijk*. Oni turnu sin al tiuj adresoj.

Altlernejo. Ni atendas de K-doj, kiuj certe partoprenos la Kongreson k kiuj povos lekcii fakece pri iu grava eduka aŭ scienca temo, ke ili sin anoncu kiel eble plej baldaŭ, por ke ni povu ĉe la starigo de la ĝenerala Programo fiksi la tagon k horon por la lekcioj, k ankaŭ aperigi la planon. Tiuj K-doj bonv. sendi skeman resumon pri la lekcio (tre koncizan), kiun ni intencas presigi kun la anonco pri la lekcio.

Somerlernejo. La okazigo de la Somerlernejo (kun kursoj, ludo kc.) estas garantiita. Ĝi okazos de la 23. julio ĝis 2. aŭgusto en la belpejzaĝa apudpariza urbeto *Suresnes*, en proksimo de la Sen-rivero. La urbestro de la loko donis la permeson. Tie ankaŭ okazos la tendaro de la karavananoj k.a. Pro tio ke la kongresejo troviĝas en la okcidenta parto de Parizo k *Suresnes* estas okcidenta antaŭ-urbo, la distanco por atingi la kongresejon el tie, ne estas pli granda ol el ajna ne tute centra punkto de Parizo (5 km).

Korekto. Ni notis en la lasta n-o, ke la Ekspozicio pri la Pariza Komuno, montrata en St. Dionizio (St. Denis), estos fermita, kiam okazos la SAT-Kongreso. Ĵus ni ekscias, ke tiu Ekspozicio restos malfermita ĝis la 30. septembro. Sekve komuna vizito al tiu ekspozicio estas planata de la O.K.K.

Materialoj. Havigu al vi la de la O.K.K. eldonitan materialon, nome : *Afiŝo* (0.30 fr. por ekz-o), *Sigelmarkoj* (5.— por 100 pecoj), *Leterpapero* (8.— fr. por 50 pecoj) k *koverloj* (6.— fr. por 50 p.).

Aliĝu baldaŭ ! Ne atendu la lastan semajnon antaŭ la kongreso ! Vi riskas per tio esti prizorgata malpli rapide ĉe via alveno, ekz. rilate la loĝigon. Indiku viajn dezirojn rilate loĝadon kune kun via aliĝo ! Ne ŝanceliĝu pri via decido : se via buĝeto k viaj ferioj permesas la Pariz-vojaĝon, faru ĝin ! La Pariza kongressemajno restos por vi neforgesebla memoraĵo. Kaj krome vi helpas grave per via ĉeesto al la celado de via Asocio.

Ni memorigas, ke la kotizo estas : 20 ffr. (2.— gd.) aŭ ekvivalento, k ke nemembroj (*gastoj*) pagas la saman sumon.

O. K. K.

3. *Listo de aliĝintoj.*

57. Julius Ege, Los Angeles, Usono ;58-59. Gek-doj Lentaigne, Villeveyrac, Francio ; 60. K-dino Jacomin Vict., Saint-Jean-de-Maurienne, Francio ; 61. D. Fernandez, Bilbao, Hispanio ; 62. Vict. Haignère, Boulogne-s-Mer, Francio ; 63. Ernst Erikson, Stokholmo ; 64. Joh. Rival, St.-Etienne, Francio ; 65. Artigas Trigo, Zaragoza, Hisp. ; 66. Juncadella Lopez, Zaragoza, Hisp. ; 67. Marion Barney, Los Angeles, Usono ; 68. C. ten Bruggencate, Enschede, Nederl. ; 69-70. Gek-doj J. Frielink-Nabes, N. Scharwoude, Nederl. ; 71-72. K-dinoj W. k B. Frielink, N. Scharwoude, Ned. ; 73. K-dino Eisinga, Veendam, Ned. ; 74. K-dino Schuitemaker, Oosthuizen, Ned. ; 75. K-dino B. Ohlson, Enskede, Svedio ; 76. N. D. v. Biezen, Rotterdam ; 77. K-dino Swart, de Beets, Ned. ; 78. F. Oliemans, Rotterdam ; 79. K-dino Slootweg, Huizen, Ned. ; 80. P. Wessel ; Hago, Ned. ; 81. M. Medema, Buinen, Ned. ; 82-83. Gek-doj Veenendaal, West-Graftdijk, Ned. 84. K-dino R. Chapotot, Paris, 85. K-do F. Berlandier, Marseille ; 86. K-do J. v. Scheepen, Hago, Ned. ; 87. K-do Lexa, Palaiseau, Francio ; 88. K-do E. Ely, Malakoff, Francio ; 89. K-do J. Oliveras Andreu, Barcelona ; 90. K-do J. Torres Palmer, Barcelona ; 91. K-do Antonio Roig, Barcelona ; 92. K-do N. Hegrenas, Bergen, Norvegio ; 93. K-do L. Bonin, Machecoul, Francio ; 94. K-do K. Gehmayer, Attnang, Aŭstrio ; 95. K-do J. Germain, Paris ; 96. F. ten Hagen, Amsterdam.

Proponoj al la XV-a Kongreso

3.

Pri la Jarlibro : En ĉiu loko (urbo, komunumo), kie loĝas neniu SAT-ano, sed kie ekzistas grupo, kurso aŭ ano de LEA ligita konvencie kun SAT, la nomo k adreso de almenaŭ unu K-do aperu en la Jarlibro (kompreneble, kondiĉe ke tiu ĉi K-do bonvole akceptu). Malgranda sumo (5.— fr. fr.) estu pagota ĉu de la K-do, ĉu de la LEA, — loka grupo aŭ centro.

Klarigo : Efektivigo de tiu ĉi propono faciligos la laboron de la diversaj SAT-fakoj, por la grupiĝo, precipe de la novaj fakoj, kiel tiu, al kiu apartenas la subskribinto.

Pri-mara komisaro de SAT k FEO : A. Belaud, SAT-ano 18 515.

Memornoto

Represis el « S-ulo » : *Grafički Radnik*, Zagreb, 21.5., pri lingvo de usonanoj k turka lingvo.

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Signalen*, Stokh., 9., 16., 23., 30.5. ; *Arbetaren*, Stokh., 7., 17.5. ; *Sarpsborg Arbeiderbladet*, 11. 5., let. k div. notoj, esp. kalendaro, programo ; *Le Semeur*, Falaise, 18.5. ; *Le Libertaire*, Paris, 3.5. ; *De Nieuwe Fakkel*, Amsterd., 7.5., 4.6. (rubr.) ; *Los Angeles Post Record* (k kelkaj aliaj kalif. gazetoj), 16.4. (de Dana Slit) ; *La Fédération*, Paris, apr. (kommunum-lab. sindikato) ; *Nueva Provincia*, Bahia Blanca, 28.4. (paĝo) ; *De Morgen*, Helmond, 1.6. (pri la SAT-gazetoj).

Esperanto-Ekspozicio en Ŝanhajo okazos en oktobro. Oni dankeme akceptos ĉiujn materialojn sendatajn de fervoraj ges-anoj el ĉiu lando. *La Ekspozicia Komitato de S.E.L.*, N-o 14, Lane 169, Carter Road, *Shanghai*, Ĉinio.

Valoraj Dokumentoj por Amatoroj !

Restas al ni pluraj kompletaj jarkolektoj de la SAT-organoj !

Nekontestebla estas la valoro de tiaj kolektoj (precipe de « S-ulo »), kiuj spegulas fidele la penadon por esp-o en la laboristaj medioj.

Tre instrua por la nuno estas la ekzakta kono pri la pasinto. *Plena kolekto* de « Sennaciulo » estas la plej viva k plej impresa Historio pri nia movado. Novuloj povus ĉerpi multegon el tia verkego !

Rekomendinda ankaŭ por grupaj bibliotekoj kiel konsultilo !

Favoraj kondiĉoj :

Sennaciulo, jaroj I-VIII inkluzive (pezo : pli ol 10 kg) : Prezo : nur fr. fr. 150.— inkluzive afrankon.

La Nova Epoko, jaroj VI-VIII inkluz. (pezo : 1.300 gr.) : Prezo : nur fr. fr. 25.— inkluz. afrankon.

Sennacieca Revuo (unua serio), jaroj I-V, mankas n-oj 1 k 2 de la jaro IV-a (pezo : 1.400 gr.), nur fr. fr. 30.— inkluz. afrankon.

SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20.

Tra la Filtrilo

El la regno de du diktatoroj

En Germanio la egalrajto de la virinoj estis abolita de la venkinta faŝismo. « La loko de la virino estas ĉe la hejma forno », per tiu ĉi devizo la virinoj estis forpelataj el ĉiuj gravaj publikaj oficoj. Lastatempe la direktorinoj de 33 liceoj por knabinoj estis pensiataj k anstataŭataj de direktoroj. Hitler deklaras, ke la edukado estas afero por viroj. La diktatoreco en Germanio markas do paŝon returnen pri la samrajteco de la seksoj.

En *Turkio* la diktatoreco havis tiurilate alian efikon. Kemal Ataturk, certe unu el la plej rimarkindaj figuroj de la moderna historio, revoluciigis en profunda senco de la vorto tiun dum jarcentoj dormintan landon, regitan de same despotaj kiel degenerintaj sultanoj. La virinoj tie estas liberigitaj el la monaĥina vivo k eniris parlamenton k publikajn oficojn. Dum malmultaj jaroj okazis tie reformoj efektivigitaj en aliaj landoj nur dum jarcentoj.

Kemal Ataturk anstataŭis la araban skribon per la latina. Hitler oficialigis la malnovan gotikan skribon en la ŝtataj oficoj. En unu punkto ili estas ambaŭ akordaj : Ili malpermesis la laboristan movadon.

La multlingveco en Sovetio.

En 1913 la libroj publikigitaj en Rusio estis presataj en 29 lingvoj. En 1928 tiu ĉi nombro atingis 89 k nuntempe la libroj aperas en 104 lingvoj !

Bonaj perspektivoj por esperanto !

Forgesita 38- semajna striko

« La striko estas finita, ni ne povus pliajn dungi, eĉ se ni volus. Ni jam okupis ĉiujn lokojn de la strikintoj », tiel diris oficisto de R. Ĝonzon k Nefju (Richard Johnson and Nephew), metalfaden-fabrikantoj en Bradfordo, Manĉestro.

La striko preskaŭ forgesita daŭris preskaŭ naŭ monatojn kaj estas nun deklarita finita. 550 kuraĝaj metalfaden-laboristoj strikis proteste kontraŭ la enkonduko per la firmo de plirapidiga sistemo (Bedo). Subtenate de sia sindikato (la Unuiĝo de Metalfaden-laboristoj k parencaj metioj), ili plejparte kuraĝe rifuzis reiri labori sub tiu sistemo. Dum la unuaj monatoj konfliktoj okazis kelkfoje kun la polico, kiu protektis la strikrompantojn.

Por malgrandigi la suferojn de la strikintoj k iliaj familioj, kiuj preferis suferi ol cedi siajn principojn, la Konsilantaro de Metiaj Sindikatoj Manĉestra k Salforda kolektis la monsumon de £560; gestoj de simpatio k financa helpo venis el aliaj urboj.

La strikintoj sin konsideras nun kiel maldungitaj k ricevas la ŝtatsubvencion. Sub la aŭspicioj de la sindikato 30 intencas starigi fabrikon laŭ koopera sistemo.

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj

La 20-a Kongreso de F.L.E.[1] *en Groningen.*

Ni resumas la pason de tiu LEA-Kongreso vizitita de proks. 400 *Gek-doj el la nederlandlingva regiono, laŭ la raporto aperinta en la maja n-o de « Lab. Esperantisto » (Amsterdam) :*

La kongresan malfermon antaŭiris bone sukcesinta fetsvespero, en kiu precipe sin distingis la junularo. Estis prezentata teatraĵo «La sankta deĵoro ». La du paskotagojn okazis tri laborkunsidoj k unu kunsido de la SAT-anaro. La komunum-estraro akceptis la kongresanojn en la Urba parko k ankaŭ la loĝantaro de la negranda kongresurbo tre atentis la kongreson. La diligenta loka sekcio de la Federacio faris gravan laboron por nia afero.

La membronombro de la Federacio proksimiĝis en la lasta jaro al la tria milo, kunigita en 108 sekcioj (antaŭjare : 83). 5.000 ekz-oj de « Nia Lernolibro » (lastjara eldono) estas preskaŭ elvenditaj. « Lab. Esperantisto » atingis eldon-nombron de 4.700 ekz-oj. La estraro respondis al kritikoj pri la profito rezultanta el la librovendado, ke tia kapitalon formanta profito por la organizo estas vivneceSa, k ke tiu profito eĉ ne ekzistus, se ĉio estus pagata kiel en privataj entreprenoj (ekz. salajroj, kc). Same la estraro rimarkigis, rilate kritikon pri la kotizpago k la SAT-kotizo, ke certe estus pli facile al SAT malplialtigi siajn kotizojn, se la granda plimulto da federacianoj estus SAT-anoj (kio ja tute ne estas !). La propono de unu ŝekcio ĉesigi la liveradon de « S-ulo » al la federacianoj, estis malakceptita post vigla debato per 2.176 voĉoj kontraŭ 47 (nur la proponintoj). Tiu debato donis al pluraj K-doj la bonan okazon esprimi sian tre laŭdan opinion pri la SAT-organo. La estraro estis reelektata (kun unu nova ano por la eksiĝinta sekretario). Kiel venontjara kongresurbo estas elektita *Hago*.

La kunsido de la SAT-anaro okaze de la FLE-kongreso elektis K-don *Bas Vels* kiel ĉefperanton por Nederlando ; li havas por sia laboro la subtenon de la LEA-estraro, same kiel tiun de la P.-K. de SAT.

[1] *LEA* por la nederl.-lingvaj regionoj.

Diversaj komunikoj

Ni estas petitaj konigi jenan informon : Nombro da militrifuzantoj en Nederlando (225) dissendis manifeston, en kiu post atentigo pri la nuna militdanĝero ili turnas sin ne nur al ĉiuj homoj persone, sed ankaŭ nepre al ĉiuj organizoj sin deklarintaj kontraŭ milito k militpreparado, sciante, ke la militrifuzado, kiel eble plej multe k amase praktikata, formas la nuran metodon, kiu finfine povos malebligi militojn. La subskribintoj de l'manifesto antaŭ, dum k post la mondmilito estis malliberigataj kune pli ol 200 jarojn. (Ne enkalkulitaj estas tiuj, kiuj pravigis sin per tielnomata « militrifuzantleĝo » k plenumis anstataŭe « civil-servon »). Adreso de l'sekretariejo de tiu movado : Bolksbeekstr. 27 bis, *Utrecht* (Nederlando).

« Internacia perfektiga kurso » (8.-13. julio), « Seminario por Cseh-metodaj instruistoj » (15.-20. julio), « Internacia kunveno de esp. geinstruistoj » (25.-29. julio) okazos en *Arnhemo* (Esperanto-Domo, Esperanto-laan 3). Aliĝ-k informpetojn adresu al *Intern. Cseh-Instituto*, Riouwstr. 172, *Hago*, Nederl.

(Al K-doj, kiuj intencas partopreni la SAT-Kongreson ĉi-jaran, ni rekomendas ĉi-okaze la komunikon pri la *Somer-lernejo apud-pariza*, vd. p. 52, kies organizantoj celas proksimume la samon kiel la Instituto en Arnhemo k en kiu ankaŭ partoprenos nombro da geinstruistoj.)

Stando de esperanto en la Foiro de Parizo

Foiro, kiun multaj centmiloj da homoj vizitas, estas certe unika okazo por propagandi esperanton. Despli ĉagrene oni devis konstati, ke la aranĝo de la esperanto-stando neniel respondis al la gravo de la okazo. La materialo ŝajnis origini el la pasinta jarcento k apenaŭ kompletiĝis per eldonaĵoj de nia epoko. Ne vidante eblon lavi la manojn post foliumado de gazetoj k libroj polvokovritaj, la publiko kontentiĝis plenstreĉe okulumi ilin por malkovri titolon k signifon de la prezentita varo.

Entute : La stando ne estis alloga k tute ne konformis al la bezonoj de efika propagando.

Vizi Tinto.

Du esperantistoj intencas viziti la SAT-Kongr. (Parizo). Veturas bicikle tra Belgio, Reims, Reveturo tra Calais, Lille, Belga marbordo k Bruselo. Petas esp-istojn en tiuj div. lokoj helpi ilin per zorgo pri *nur* malmultekosta tranoktejo k manĝejo. Nenion senpage. Bonv. skribi al : *J. Hansen*, 25, rue Marie-Henriette, Verviers (Belgio).

Aperos en julio :

Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?

de *E. Lanti* k *M. Ivon*

48-paĝa (14 × 21 cm) broŝuro, verkita en formo de dialogo inter tri personoj : *Futer*, la herezulo, *Ruper*, la ortodoksulo, *Iver*, la objektiva atestanto, sovetiano, kiu forlasis la landon antaŭ nelonge.

La verketo kostos nur 3 fr. fr. (2 respondkuponojn), kvankam ĝi estos eldonita per bela papero, estos zorge presita k enhavos ilustrojn.

Al la personoj, kiuj antaŭmendos k pagos, ni sendos afrankite 3 ekz-ojn por 6 fr. fr. aŭ 4 respondkuponoj. Tiu tre favora prezo kompreneble valoros nur ĝis fino de julio. Profitu la bonan okazon. Neniu bedaŭros esti akirinta tiun broŝuron, verkitan en vigla, facila stilo, laŭ agrabla formo k helpe de atestoj k dokumentoj nekontesteblaj.

Mendu tuj, sendu la monon al la adreso de *Herezulo* 14, avenue de Corbéra, *Paris* (XIIe) ; uzu prefere, se eblas en via lando, la poŝtan ĉekkonton : E. Adam, *Paris* 1350-62.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

« Heroldo » bastonas la tamburon.

Ju pli proksimiĝas la dato de la Universala Kongreso en Romo, des pli laŭtiĝas la tamburbatado de « Heroldo », kies paĝoj elradias optimismon des emajno al semajno ŝvelantan. Kaj ĝin eĉ ne malvarmetigas okazaj akcidentoj, kiel kunigo de du n-oj en unu dusemajnan, ĉar por la kuranta semajno la atendita manuskripto ne venis ! Male ! Ĉie saltas en la okulojn kuraĝigaj, per dikegaj literoj presitaj vokoj, ekz. « Esperanto venkos... (se ni firme volas k diligente laboras) » k « Esperanto vivas », ĉar sub tiu rubriko ni legas, ke... en Vieno « s-ano A. prelegis rimitajn enigmojn k s-ano B. humoran poemon », dum en Köln « s-ro S. instruparolis pri la kuireja ilaro... f-inetoj H. k K. prezentis dancojn k akrobatikajn (! *Red.*) dancojn... s-ano R. rakontis du ŝercojn el tramista vivo », ktp, kc. Mirige, ke oni ne citis la markon de cigaro, kiun oni fumis ! Vere, la redaktoro de « Her. » disponas pri sufiĉe da materialo por plenigi siajn paĝojn (cetere, ĉie brilas blankaj nesurpresitaj spacoj favoraj al la gazetbuĝeto), k plie sufiĉan porcion da optimismo, por kredigi al facilkredemuloj la proksiman venkon de esperanto tra la mondo.

En Aŭstrio ree aperas esperantlingva gazeto !

De kvin monatoj aperas en Vieno la « Verda Revuo » (sendependa revuo pri arto, scienco k amuzo), tute en esperanto[1]). Tute nature venas al ni tiu unua penso : — Jen ankoraŭ iuj, kiuj opinias, ke la ĝisnunaj esp-gazetoj ne sufiĉas, ke ili havas tro da abonantoj, k sekve necesas eldoni plian. Tamen, eble specialaj konsideroj (prospero de l'movado en Aŭstrio, deziro propagandi per esp-o pri aŭstriajoj en eksterlando, pli facila aboneblo por aŭstroj sub faŝismo al *en*landa gazeto) kaŭzis la kreon de tiu revuo, cetere presita sur bela papero k ilustrita per logaj fotoj. La kunlaborantoj estas aŭstraj espistoj. Ĉio estas aŭstra..., krom la lingvo. *N. B.*

Danĝera fatalismo

« La Suda Stelo » N-ro 4-5, de majo, citas diron de E. Drezen, « ke esperanto progresis iom same, kiel normale progresas iu ajn planto plantita, sed speciale ne zorgata », k kun logiko asertas :

Ke ĝi ankaŭ pluen daŭrus progresi, eĉ *sen ia niafara aparta zorgado* (substreko mia, H.P.), estas nepre. »

Povas esti, ke -Sro D-ro Lapenna havas tian misteran kapablon antaŭvidi la estonton por tiel firme aserti la nepran venkon de esperanto sen la pionira laboro. La meteorologio estas jam preskaŭ ekzakta scienco k tamen neniu fakulo kuraĝus garantii al kamparano la sekuron de lia planto. Desmalpli certe ni povas rilati al la estonto de la socio, ĉar la scienco pri la historio troviĝas ankoraŭ en infanaĝo. Laŭ propaganda vidpunkto la efiko estos kontraŭa al la intenco de D-ro Lapenna, ĉar oferemaj pioniroj, batalantaj por idealoj, ne vidas utilon k neceson oferi por *fatale* realiĝonta afero. *H. P.*

[1] Red. k Adm. Wien VII, Hermanngasse 31-26. Jarabono : 3 sv. fk. Formato de « S-ulo » 8 paĝoj.

Skribinte fiere sur sian standardon la batalon kontraŭ la Nacieca Spirito

Sennacieca Revuo

en sia junia kajero dediĉas interesan artikolon al tiu problemo. Same en tiu n-o estas studata la ekonomia krizo k ĝiaj leĝoj. Raportoj el Germanio, Hispanio, Sovetio k Usono.— Diskutejo .— Ampleksa literatur-scienca parto. — Literatura kritiko. Ktp kc.

Prezo de la n-o: 2.25 fr. fr. Jarabono: 25. fr. fr.

SAT, 67, *avenue Gambetta, Paris* 20.

Grava avizo al korespondantoj

Laŭ informoj ricevitaj el Germanio oni arestis Kamaradon (Rejna regiono) pro leteroj senditaj k ricevitaj. Estas nepre necese ĉesigi la alsendon de leteroj aŭ, en dubo, informiĝi antaŭe « pri la farto » de la tieaj korespondantoj: Ĉi-loke ni admonas al plej prudenta sinteno de ekstergermaniaj korespondantoj.

La Red.

“ Popollernejo k Ekonomia Krizo ”

En sia venonta kongreso nia Federacio, kiu arigas la revolucitendencajn geinstruistojn el Francio, intencas pridiskuti tiun gravan aferon. Ni volus per enketo havigi al ni informojn pri la nuna situacio de la popolinstruado en la aliaj landoj.

Ni esperas, ke esp-o helpos al ni k ke alilandaj gekolegoj bonvolos skribi al mi. Ili estu tutkore dankataj !

1. — Kiel evidentiĝis en via lando la atako de la burĝaro kontraŭ la popollernejo ? (diversspecaj ŝparoj, salajraj malplialtigoj, lernejoj fermataj, ktp.). Ĉu kontraŭstaro estis organizata ? Kiel ?

2. — Ĉu en la instruistaro estas senlaboruloj ? Ĉu la sindikataj organizoj klopodas pri ili ? Kiun rezulton ili atingis ?

3. — Ĉu la nombro da analfabetoj plimultiĝas?

4. — Procente, kiu estas la porinstruada buĝeto rilate la tutan buĝeton ? Rilate la pormilitan k porpolican buĝeton ?

Bonvolu sendi la respondojn al :

M. Valière, instruisto en *Fabrègues* (Hérault), *Francio.*

Korespondado

CEĤOSLOVAKIO

Kiu sendos al mi 50-100 PM el sia lando, tiu ricevos de mi saman kvanton el mia lando. Tuj resp. al ĉiuj. Adr. : *Josef Wuchterl. Holeischen* 127 ap. *Plzen.*

Kontoristino dez. koresp. L., PK., k.ĉ.l., p.ĉ.t., kun samgefakuloj. Certe resp. *Ludmilla Erben, Grünwald a.N.* 270 b/ Gablonz a.N.

Esperanto-rondeto Aŝ aranĝos komence de aŭgusto *leter vesperon.* Skribu multnombre al : K-dino *Anna Prockl, Asch II* - Nassengrub, 75 ; K-do *Karl Slöcker, Asch,* Masarykstr., 173. Resp. garantiata.

NEDERLANDO

K-do *P. T. v.d. Vlies,* Middeldijk C 263, *Barendrecht,* dez. koresp. kun Gek-doj ĉl. Mi certe respondos.

Kelkaj pli malpli spertaj Gek-doj dez. kor. k.ĉ.l. Gek-doj pri ĉt. Resp. garantiata. Skribu al : K-do *J. H. Nieuwenhuizen,* Laakhof 37, *Den Haag.*

Nederlanda kompostisto dez. korespondi kun aliaj kompostistoj pri ĉiuj temoj rilataj al fakmovado ktp. Resp. garantiata. *H. van Teeffelen.* Spartastr. 12 A, *Rotterdam.*

K-do *J.J.C. Kok Jr.,* Stortenbekerstr. 206, *Den Haag,* 2u-jara, dez. kor. kĉl pĉt, prefere pri amatorfotografio.

Ned. K-do dez. kor. kĉl k pĉt. Resp. garantiata. Adr. : K-do *A. W. Treurniet,* Brederodestr. 46 b, *Rotterdam-West.*

Atentigo ! K-dino Brumer (11 700) ne plu estas landa peranto por Aŭstrio. Bonvolu tion noti k korekti en la Jarlibro (p. 7).

Granda nombro da kurspartoprenintoj deziras praktiki esp-on per serioza korespondado. Je la komenco de julio ni aranĝos korespondvesperon k honeste respondos al ĉiuj, kiuj sendis leteron aŭ bildkarton. Adresu : K-do *B. Buttemeyer,* Geuzenkade 51, I, *Amsterdam (West),* Nederlando.

Recenzejo

LA JUNA VIVO. Unua jarkolekto de tiu revuo por la dekdu- ĝis deksesjara junularo bindita kiel libro. Prezo : 8. fr. fr. aŭ 6 resp.-kuponoj. Mendebla ĉe la Redakcio : *Veenendaal, West-Graftdijk,* Nederlando.

La enhavo konsistas ĉefe el legmaterialo ĉerpita el lernejaj legolibroj. Verkistoj k tradukintoj estas preskaŭ senescepte geinstruistoj ; la kompilado okazis kun pedagogia talento.

GVIDFOLIO DE DIKSMUIDE. Eldonita de la Turisma Oficejo, Diksmuide, Belgio. 4 p. Ilustrita. Precipe militmemoraj vidindaĵoj.

Radio-notoj

Minsk (1442 m), disaŭdigas ĉiumonate je 21.45 h-21.55 h. MET ĉiun 6, 9, 12, 16, 18, 22, 24, 28, 30-an. Oni skribu pri aŭdeblo k pri la enhavo al Esp. Fako de Minska radio-komitato (ul. Kirova 16, Minsk, USSR).

Radio Brno ricevis 1178 korespondaĵojn el 23 landoj k tri kontinentoj post disaŭdigo en esp-o de la opero de Smetana « Vendita Fianĉino ».

La stacio *Ljubljana* (Jugoslavio) aranĝis Esperantan Semajnon komence de junio kun ĉiutagaj esp. disaŭdigoj.

Ĉiu aktivulo havigu al si k trastudu serioze la verketon :

HISTORIO PRI LA SKISMO

en la laborist-esperanta movado.

Dokumentoj, faktoj, resumaĵo pri dorna periodo.

20 paĝoj. Form. 13 × 20. Prezo : 2.— fr. fr. 5 ekz-oj nur 7.— fr. fr. afrankite.

SAT, 67, *avenue Gambetta, Paris* 20.

ABSOLUTISMO

Parolado de E. LANTI farita en 1934 okaze de la Antverpena FLE-Kongreso. Studo pri aktuala problemo. 16 paĝoj. Form. 13 × 20. Prezo : 1.— fr. fr.

Ĉe SAT. Nederlandanoj mendu ĉe FLE.

« La legado de la unua n-ro de *Herezulo* taŭzis mian animon, hirtigis miajn harojn, unuvorte skuis min tute. Vi komprenu per tio, ke mi ne konsentas kun la enhavo de via nove naskita organo. Sed almenaŭ mi devas sincere konfesi, ke mi legis la tutan kajeron kun granda intereso ; tial mi sendas al vi 4 respondkuponojn por unujara abono... »

Tiel esprimis sin inteligenta, duma ortodoksulo, al kiu ni estis sendintaj provekz-on de

HEREZULO

Sendependa revuo por batalo kontraŭ ĉiajn dogmojn

Vi imitu tiun sinceran homon ; vi abonu al la organo, kiu diras tion, kio ne estas direbla en aliaj esperantaj gazetoj. Vi sendu senprokraste 4 internaciajn respond-kuponojn al : *Esperanto,* 14, avenue de Corbéra, *Paris (XII),* aŭ 6 fr. fr. al :

Poŝta ĉekkonto : *E. Adam,* Paris 1350-62.